



ĈAR LA MILITO ANKORAŬ NE FINIĜIS

La PPT⁽¹⁾, IPT⁽²⁾ kaj SDF⁽³⁾ venkis la Islaman Ŝtaton, kun helpo de internacia koalicio. Ne estas klare, kion oni faros kun la kaptitaj batalintoj, nek kie oni juĝos ilin.

La 6-an, 7-an kaj 8-an de junio okazis en Kamjŝlo⁽⁴⁾, organizita de la Roĵava Centro de Strategiaj Studoj⁽⁵⁾, Internacia Forumo pri la Islama Ŝtato⁽⁶⁾. La PPT, IPT kaj SDF venkis la IŜ-on en la milita fronto kun helpo de internacia koalicio, kies kapo estis Usono. Dum tiuj ĉi kvin jaroj de milito mortis dumbatale 11 000 IŜ-volontuloj, kaj aliaj miloj estis vunditaj. Oficiale, la IŜ perdis la tutan teritorion, kiun ĝi kontrolis en Sirio kaj Irako, sed kiel deklaris la reprezentanto de la SDF, Polat Can: “La IŜ pli ol io ajn estas ideologia organizaĵo. Pere de la disvolvigita operaco en al-Baghuz Faŭŝani ni sukcesis faligi la kalifejon, sed ni scias, ke ekzistas kelkaj dormantaj ĉeloj, ke kelkaj personoj ankoraŭ sekvas ĝian ideologion, kaj ke inter la loĝantaro estas kaŝitaj IŜ-anoj. Tial, la lukto kontraŭ la IŜ estas pleje ideologia, amaskomunikila kaj socia. La Islama Ŝtato, kiel ideologio, ankoraŭ ne ĉesis. Dum la IŜ-minaco restos, ni daŭre batalos.”

Miloj da arestitoj

La celo de la Aŭtonoma Administrado de Norda kaj Orienta Sirio⁽⁷⁾ estas, ke la internacia komunumo sin devontigu helpi por elradikigi la IŜ-on. Laŭ la Roĵava Inform-Centro⁽⁸⁾, nuntempe, la memadministrado havas arestitaj 11 000 soldatojn, kaj ankaŭ aliajn 74 000 virinojn kaj infanojn aliĝintajn al IŜ; plejmulto el ili vivas en la dense loĝata rifuĝareo de Hol’⁽⁹⁾, en la provinco de Hesiĉo⁽¹⁰⁾. La bontenado de la Hol-rifuĝareo kostas al la aŭtonoma administrado 700 000 dolarojn ĉiutage, kaj tio estas granda elspezo por teritorio detruita de la milito.

Plejmulto el la arestitoj estas el Irako kaj Sirio, sed laŭ la RIC ĉirkaŭ 4500 el ili estas eksterlandanoj el almenaŭ 54 landoj. Ĉiu lando havas propran politikon por reenpatrujigo kaj por juĝo de la IŜ-batalintoj kaj ties familioj. Ĝis nun, nur Sudano, Kosovo, Maroko kaj Malajzio sin devontigis reenpatrujigi siajn civitanojn, kaj nur Kazahio ekfunkciigis la revenigprocezon, sen diferencigi inter soldatoj kaj civiluloj.

Britio, Nederlando, Germanio kaj similaj ekonomiaj kaj politikaj potencoj havas plej severan sintenon kontraŭ la reenpatrujigo de la IŜ-batalintoj kaj civiluloj kun riskiga profilo. Iuj landoj esprimis sian eblan intencon forpreni la pasporton al tiuj, kiuj aliĝis al la IŜ kaj al kiuj havas duan naciecon. Jean-Charles Brisard, franca internacia asesoro kaj priterorisma fakulo, diris, ke la franca registaro forlasis la decidon reenpatrujigi la francajn civitanojn membrantajn en la IŜ: “Komence, ni pretis enpatrujigi kaj juĝi niajn ĝihadistojn, kaj subite, ni ŝanĝis nian opinion. Kiel en plejmulto de la eŭropaj landoj, ni devis alfronti la publikan opinion. La socio timas la revenon de tiuj ĝihadistoj; tial nun oni devas decidi, kie juĝi ilin, ĉu en Irako, ĉu en Sirio.”

Internaciaj kortumoj

La 25-an de marto, en la sama tago, en kiu oni proklamis la finon de la milito kontraŭ la IŜ, la Aŭtonoma Administrado de Norda kaj Orienta Sirio faris formalan peton al la Internacia Koalicio: starigi internacian kortumon por surloke juĝi la IŜ-anojn. Mizgin Ehmed, membro de la direktoraro de la aŭtonoma administrado, diris la jenon: “Ĉiuj landoj akordas, ke la IŜ devas esti juĝata, sed neniuj diras kie. La gefiloj de tiu ĉi lando estis martiroj, kaj tie ĉi la familioj perdis sian domon kaj ĉion, kion ili havis. La Islama Ŝtato krimis tie ĉi, kaj do, tie ĉi ĝi devas esti juĝata.”

La internacia kortumo povus juĝi la aŭtoktonajn kaj fremdajn membrojn de la IŜ ne laŭ ilia deveno, sed rilate ilian kulpecon pri militkrimoj, krimoj kontraŭ la homaro kaj genocido. Starigi internacian kortumon surloke faciligus la krim esploron, kaj ankaŭ la rektan rilaton kun la viktimoj. Tiel oni forigus la timojn de alilandanoj, kiuj zorgas pro la manko de pruvoj kontraŭ la IŜ-anoj, kiuj, reenpatrujiginte, estus juĝataj kaj, pro tiu pruvmanco, liberigataj.

Estas kreitaj du internaciaj kortumoj, ambaŭ agnoskitaj de la Sekurec-Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, ĝuste por juĝi militkrimojn kaj krimojn kontraŭ la homaro, tiuj de Ruando kaj Jugoslavio. Tamen, por plene forigi la tutmondan minacon de la IŜ estas necesa la internacia komunumo kaj, precipe en la lukto kontraŭ la IŜ, la helpo kaj firmaj decidoj de la internacia koalicio.

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

- (1) Popolaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Gel).
- (2) Inaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Jinê).
- (3) Siriaj Demokrataj Fortoj (SDF)/Hêzên Sûriya Demokratîk (HSD).
- (4) Qamîshlo.
- (5) Navenda Rojava ya Leklînen Stratejîk.
- (6) Komcivîna Navneteweyî ya li ser DAÎŞê.
- (7) Rêveberiya Xweser a Bakur û Rojhilatê Sûriyeyê.
- (8) Rojava Information Center, en la angla.
- (9) Hol.
- (10) Hesîçe.



KLARIGOJ:

Aŭtoro: Sara de Ceano-Vivas Nuñez.

Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 6-an de Aŭgusto 2019-a.

Tradukis: NXC. Aŭgusto 2019-a. Provlegis: DS.



ROJAVA
INFORMATION
CENTER